

Zone Euro - Eurojejo : 3,50 €
Autres pays - Aliaj landoj : 4,50 €

Organe de l'Union des Travailleurs Espérantistes de langue française



sat-amikaro.org



La 71a Kongreso de SAT-Amikaro en Montluçon Le 71ème congrès de SAT-Amikaro à Montluçon

P.7

**BONAN NASKIĜDATREVENON ANDRÉE !
100 JAROJ EN 2019 !**

P.2

**LA VORTO DE LA SEKRETERINO
COLETTE**

P.3

FINANCA RAPORTO 2018

P.4

**MORTPUNO
EKSCIU PRI KOKINO**

P.6

**Libro : LAMENTO (1944-1994)
ĈU LEGOMO AŬ ĈU FRUKTO**

P.10

**KIAM LA SUDO FINANCAS LA NORDON
DU TEKSTOJ FAR BRIGITTE FONTAINE**

P.11

PREZENTO DE LA FILMO 'ESPERANTO'...

P.12

LIBRO VIVAS PLI LONGE OL UNU SEZONO

P.13

Daŭrigo : KIAM SOLIDARECO INTER RIĈAJ ...

P.15

TRA LA FENESTRO

P.16



**ESPERANTO
92a SAT-KONGRESO
BARCELONO
4 - 11 aŭgusto 2019**

BONAN NASKIĜDATREVENON ANDRÉE !

100 JAROJ EN 2019 !

BON ANNIVERSAIRE ANDRÉE ! 100 ANS EN 2019 !

Far Teresa



Mia edzo kaj mi konatiĝis kun Andrée Houlgatte en la somero 1978 en Lektor', kie okazis la kongreso de SAT !

Freŝbakita esperantistino, mi eklernis en somero 1977, jam pere de libreto « Que Sais-je ? » kaj poste per korespondaj kursoj de SAT, kies informojn mi trovis ĉe « leteroj de la legantoj » en « Que sais-je ? » post vojaĝo al Sovetunio en 1976. Tamen Esperanto estis lingvo, kies ekziston mi jam konis, ĉar, kiam mi estis deksejaraĝa, en la jaro 1951, okazis perradia kursoelsendo, kiun mi kaptis iun sabatan matenon kaj lernis pri la O, A, E, I finaĵoj. Malfeliĉe, tiam unu el du sabatoj mi akompanis mian patrino por helpi ŝin en lavado de la tukoj en publika lavejgo. Poste, mi ne plu aŭdis prie.

Mi atingis Lektor-on iun posttagmezon, kiam ĉiuj estis for por vizito al la regiono. Oni vendis al mi la dokumentojn de la kongreso (ŝajnas por aliĝo) kaj mi atendis revenon de la promenantoj, el kiuj estis Gilbert Lebec kaj mia instruisto.

Du bicikloj kun iu stranga tendo longa, mallarĝega altiris niajn rigardojn. Alvenis la proprietuloj, Andrea



kaj ŝia kunulo Roger, kiuj estis sufiĉe maldikaj por enteni en tia malgrandega elŝtofa loĝeĵo. Kiel Gilbert Lebec, ili ankaŭ estis membroj de Esperanto Migranto, kiun ankaŭ ni aliĝos kaj dum jaroj frekventos por migri en pariza regiono.

Andrée kun Roger plej ĝenerale estis la preparantoj de tiuj dimanĉaj migradoj kun dekvino da esperantistoj. Tiam mi kutimis de la jaro 1982 regule, ĉiun januaron organizi promenon laŭborde de la Marno ĝis mia domo en Ormesson, kie ni manĝis saŭrkraŭton, kiun mi preparis kaj kiun frandis Andrée. Ĉiam venis Andrée kaj Roger (ĝis sia morto). En 2019, mi devis ĉesi pro miaj kruroj. Andrée vere bedaŭris tiun ĉeson !

Pri Esperanto, Andrée foje partoprenis por instrui en diveraj aranĝoj. Ankaŭ por mem pli lerni. Mi foje staĝumis kun ŝi en Kvinpetalo.

De la jaro 1994, nia grupo Esperanto-Migranto organizis jaran semajnan migradrestadon en francaj regionoj, ĉiam venis Andrée, kiu, malgraŭ sia aĝo, ĉiam marŝis ĉe la kapo de la grupo. Ŝi eĉ organizis iun en sia suda regiono en Cairquérannes. Mi memoras vesperon, dum kiu Andrée rakontis al ni sian vivon en Alĝerio, kiel instruistino, okaze de migrado kun koleginino por viziti piede semajnfine alian koleginon, kiu instruis en malproksima kaj izolita vilaĝeto. Okaze de iu alia, en la regiono de Albi, ŝi alvenis kun lambastono. Tio maltrankviligis nin, kaj ni esperis, ke nenio grava okazos al ŝi en loko, kie niaj poŝtelefonoj ne ebligas peti helpon de instancoj !

Bone fartu Andrée ! Finfine ni malkovris vian aĝon, kiun vi tiel longe kaŝis ! Iam diris al mi Gilbert Lebec, ke vi emeritiĝis sen ke li tion eksciis. Li malkovris tion, kiam alvokante vin ĉe via laborlernejo, la Direktorino respondis, ke vi ne plu tie laboras ! ■



MORTPUNO

PEINE DE MORT

Far Tereza

Bruno Henry, kiu, meze de marto, spektis aktualaĵon de televida ĉeno « France 24 » (internacia daŭra elsendejo de post 2008, kiu superkontrolas informojn ekstere de Francio), informis min ke, en Kalifornio, koncerne mortpunon la aferoj evoluas, ke la elsendo parte temis pri prizono San-Quentin, en kiu iu Billy Waldon de tre longe estas enkarcerigita.

Fakte, ĉe SAT, mi memoras ke en 1994, kiam mi iĝis kontistino, mi malkovris ke tiu homo havas helpokonton provizitan de SAT-anoj. Indiandevena usonano, li ĉiam kontraŭis sian kondamnon pro murdo. Surloke kaj en Germanio, estis esperantistoj, kiuj rilatis kun li por helpo.

Kia rilato estas kun Esperanto ? Oni povas tion legi en Vikipedio :

Billy Ray WALDON, pseŭdonimo Nwvtohiyada Idehesdi SEQUOYAH, nomata ankaŭ Billy Joe Waldon (naskiĝis la 3-an de januaro 1952 en Tahlequah, Oklahomo) estas usona esperantisto kondamnita al morto.

Li estas kvarona ĉeroko. En 1981, li vojaĝis al Eŭropo, kie li prezentiĝis kiel indiano kaj prelegis ĉe diversaj Esperanto-asocioj.

La 23-an de aprilo 1986, la usona polica institucio FBI metis lin sur la liston de la plej serĉataj krimuloj, pro kelkaj murdoj kaj raboj faritaj de iu(j) fine de 1985. La 16-an de junio 1986 Waldon estis arestita.


En 1991, li publikigis la planlingvan projekton Poliespo. En broŝuro pri la projekto, li rakontas ankaŭ iomete pri sia sorto kaj asertas, ke li estas senkulpa. Laŭ li, la FBI ŝatas nek Esperanton nek indianojn, kaj mem metis kelkajn pruvilojn en lian aŭton por povi aresti lin.

En 1992, li estis kondamnita al morto. Li nun vivas en malliberejo en San Quentin, Kalifornio.

La ŝtatestro de Kalifornio, Gavin Newsom, diras ke mortpuno estas ne konforma kun fundaj bazoj de Kalifornio kaj subskribis la 13-an de marto 2019 moratorion pri mortpuno en lando, kies popolo estas la plej densa el Usono. « Golden State » gastas kvaronon de ĉiuj mortpunitaj homoj el tuta Usono ! Vojo al abolicio de mortpuno estas tiu unua

paŝo, kiu profitas al 737 homoj tenitaj en « mortkoridoro » de tiu ŝtato. Li aperigos dekreton por malpermesi injekti mortigan produkton kaj ordonos fermon de la mortiga ĉambro en la prizono de San Quentin apud San Francisko. Jam, asertas la elsendo, la mortiga materialo estas eltirita de la loko. ■

NB : Ankaŭ artikolon pri B. Waldon, eblas trovi, en la paĝaro de Sat-Amikaro : N. I. Sequoyah condamné à mort en Californie.




EKSCIU PRI LA KOKINO

APPRENDRE SUR LA POULE

- 1- Ĝi unue ovumas multajn ovojn antaŭ ol ilin kovi. "Estas planado".
- 2- Kiam ĝi komencas al kovi ilin, ĝi minimumigas la movadojn. "Estas disciplino".
- 3- Ĝi komencas perdi pezon pro reduktita nutraĵo. "Estas ofero kaj sinofero".
- 4- Ĝi povas kovi ovojn de alia kokino. "Estas ne-diskriminacio kaj malavareco".
- 5- Ŝi tuj elkovos ĝiajn ovojn dum 21 tagoj, pacience atendanta, eĉ se ili ne kovos... ĝi tuj ovumos aliajn ovojn. "Estas fido kaj espero. Ne senkuraĝiĝo".
- 6- Ĝi malkovras ne fekundigitajn ovojn kaj formovas ilin. "Estas sentiveco kaj prudento".
- 7- Ĝi forlasas malpurigitajn ovojn kaj priokupiĝas pri tiuj kiuj havas eloviĝon, eĉ nur estus havas unu. "Estas saĝo, konscio, realismo".
- 8- Ĝi ĉiam kunigas ĝiajn kokidojn. "Estas la unuo en la objektivo".
- 9- Ĝi ne forlasas ĝiajn kokidojn ĝis al alia matureco. "Estas mentoro".
- 10- Ĝi ĉiam estas antaŭe de ĝiaj kokidoj. "Estas gvidado". Do,iru ĉiuj en lernejon de la kokino.

Bonan kompreniĝon! ■



Via Honore Sebuĥoro

de iliaj politikaj gvidantoj, kiuj ne efike protektas ilin, male pli interesigas pri sia propra povo ol pli sia popolo. Tion en DR Kongo pruvas la antaŭnelongokazinta epizodo de la balotoj, ĉe kiuj ne respektiĝis la plimulta volo...

Ĉu fine, same kiel la Francaj « gilets jaunes » (flavveŝtuloj), la Konga popolo ne tro pasive atendas - krom de Dio - ankaŭ de la politikaj regantoj, ke ĉi tiuj solvu iliajn problemojn, forgesante la sintenon neeviteble ambician kaj ekspluateman de politikuloj? Ankaŭ kulpas monavideco de diversaj firmaoj, kiuj siaprofite ekspluatas la mineralajn riĉecojn de la DR Kongo. Ĉiuj riĉecoj apartenu al ĉiuj!

Nia ĉiutaga vivo “espere, pacience kaj obstine” preparu la vojon al mondo vere frateca, kie dank'al nia plena respekto de ĉies libero kaj nia strebado al egaleco ne formala sed ankaŭ intima, la vortoj komunismo kaj anarkiismo ne plu timigos.

Ĉi celen, tiel longe dum ni vivas, ni respondecas pri nia tempa

kaj mona buĝeto persona. Cetere ĉiu insistas pri la malfeliĉoj, kiujn li konas, kaj oni ne povas agi ĉie. Inter la alvokoj de la suferanta homaro, jen instigis min al agado la ligo inter esperanto, sennaciismo kaj Afrika krizo.

Restas nur demando: al kiu formo de agado mi donu prioritaton? Ĝis nun la vivo instigis min al individua korespondado helpema. Sed tia agado ne plene kontentigas min, ĉar pro soleco mia kaj malproksimeco, malfacilas por mi ĝuste taksi la plej gravajn bezonojn de la regiono kie loĝas miaj korespondantoj. Tial, mi ege kontentas, ke SAT-Amikaro decidis eldoni tiun numeron pri Afriko, dank'al kio ni fruktodone interŝanĝas niajn spertojn.

Interalie, mi malkovris la ekziston de Esperanto-plus <https://esperantoplus.jimdo.com/prezentado/>, (1) kiu kunligas dekon da helpantoj por kolektiva pago de salajro al Afrikaj instruistoj de esperanto, kaj al kiu mi verŝajne reorientos parton de mia helpo. ■

Tra la Fenestro

Saluton al ĉiuj

Tra mia montrofenestro mi vidas ĉefe veturilojn sed ankaŭ metroojn, freskojn, kelkajn hundojn kaj preterpasantojn. Siaflanke la pasantoj vidas min, same, tra la fenestro. Tion, eble vi certe scias sed hodiaŭ, la demando estas tia: ĉu eblas traduki « tra la fenestro » en la franca per « par la fenêtre » ambaŭkaze por mi kaj por la pasantoj, kiuj estas ekstere de la sidejo? Vi diros al mi, tio estas « harfendado » (aŭ eĉ, se vi aŭdacos, « bugri muŝojn »).

Tamen ne, tio estas serioza demando, kiun mi aŭdis ĉi-tie, iun tagon. Kiel mi jam diris, mi havas grandajn orelojn kaj ŝatas aŭskulti interŝanĝitajn dirojn malantaŭ mi.

Kursanoj estis tradukantaj fabelon el Esperanto en la francan. En tiu historio nubo kaj knabineto, en la ĉielo, proksimiĝis al aviadilo (estas ja fabelo!) kaj rigardis tra la fenestro de tiu aviadilo.

Longa debato okazis. Ĉu vere eblas traduki, tiuokaze, tra la fenestro per « par la fenêtre »?

Pluraj energie rifuzis tiun tradukon. Nur eblas diri « par la fenêtre » kiam vi estas interne kaj rigardas eksteren, ili diris. Aliaj dubis, ĉu vere estas diferenco?

Vi ja pensas, ke mi atenteme aŭskultis, des pli ke mia kroniko titoliĝas « tra la fenestro ».

Finfine, la plimulto aprobis la ideon ne uzi « par la fenêtre » kaj ili elektis la formulon « à travers la vitre », ou « de l'autre côté de la vitre » (« tra la fenestra vitro » aŭ « aliaflanke de la fenestra vitro »).

Nu do, mi rigardas la pasantojn tra la fenestro (par la fenêtre) kaj la pasantoj rigardas min « à travers la vitre » (« tra la fenestra vitro »). Ĉu bonas? ■



Bonjour à tous,

Par ma fenêtre je vois surtout des véhicules mais aussi des métros, des fresques, quelques chiens et des passants. De leur côté les passants me voient pareillement par la fenêtre. Sans doute savez-vous déjà cela mais aujourd'hui la question est celle-ci : peut-on traduire en français « par la fenêtre » dans les deux cas, pour moi comme pour les passants qui sont, eux, à l'extérieur du siège? Vous me direz que c'est « couper les cheveux en quatre » (ou même si vous l'osiez : « enculer les mouches »).

Pourtant non, c'est une question sérieuse que j'ai entendue ici, un jour. Comme je l'ai déjà dit, j'ai de grandes oreilles et j'aime écouter les propos échangés derrière moi.

Les élèves d'un cours traduisaient un conte de l'espéranto. Dans cette histoire,

un nuage et une petite fille, dans le ciel, s'approchent d'un avion (c'est bien un conte!) et regardent « par la fenêtre » de cet avion. (« Tra la fenestro » en espéranto)

Il y eut un long débat. Est-il vraiment possible, dans ce cas, de traduire « tra la fenestro » par « par la fenêtre »?

Plusieurs ont refusé énergiquement cette traduction. On ne peut dire « par la fenêtre » que lorsque l'on est à l'intérieur et regarde à l'extérieur, disaient-ils. D'autres avaient des doutes. Y avait-il vraiment une différence?

Vous pensez bien que j'ai écouté avec d'autant plus d'attention que ma chronique s'intitule « par la fenêtre ».

Enfin la majorité fut d'avis de ne pas utiliser « par la fenêtre » et ils choisirent la formule : « à travers la vitre »

Bon alors, je regarde les passants par la fenêtre et les passants me regardent à travers la vitre.

C'est bon? ■

Ĝis, À plus, *Dzeka*